Sem učitelj in od septembra vodim tečaj esperanta v svoji osnovni šoli v Kopru (Slovenija). Esperanto poučujem dvajseterico enajstletnih učencev. To počnemo z uporabo tabličnih računalnikov in s pomočjo programa Duolingo (povezava).

Esperanto učim vsak teden po eno uro in vsak teden imam več učencev. Učenci so zelo motivirani, saj uporabljajo tablične računalnike in tekmujejo med seboj. Duolingo omogoča učencem, da si lahko postanejo prijatelji. Učenci lahko vidijo, koliko točk so zbrali njihovi prijatelji. Prav tako sem naredil tekmovanje za učence in šest najboljših učencev bo prejelo knjigo zgodb v esperantu. Donator teh knjig je Zveza esperantistov Slovenije.

Kakšne so prednosti učenja esperanta z uporabo angleškega jezika? (Esperanta se je mogoče učiti z Duolingom le z uporabo angleščine). Materni jezik večine učencev je slovenščina. Učenci, ki uporabljajo program "Duolingo" morajo istočasno razmišljati v treh različnih jezikih in zato morajo njihovi možgani delovati zelo hitro... Učenci zdaj razumejo več angleščine kakor prej. Učenci so se začeli učiti angleškega jezika s sedmimi leti, vendar se ga večina učencev uči na pamet, ne da bi dobro razumeli, kako ga uporabljati. Moje mnenje je, da z uporabo Duolinga in s pomočjo esperanta, učenci bolje razumejo, kako uporabljati angleški jezik in hkrati se učijo tudi esperanta.

Učenci se učijo povsem sami. Sami morajo razumeti pravila. Pomagam jim samo, če me prosijo. Torej možgani delujejo zelo hitro ... Hvale vredno je tudi dejstvo, da učenci pridejo deset do petdeset minut pred začetkom tečaja, mi pomagajo vse pripraviti in se začnejo učiti sami pred začetkom tečaja. Ko se tečaj konča, ne želijo iti domov. Slišal sem jih govoriti ko so šli domov: "Dežuje, igral se bom esperanta s svojim tabličnim računalnikom doma eno uro." Opaziti je, da imajo učenci Duolingo za igro pri učenju esperanta. Duolingo mi omogoča, da kot učitelj lahko vidim, koliko so se učili doma. Presenetljivo je, da se več kot polovica učencev uči esperanta doma na lastno željo. Torej mislijo, da se ne učijo nezanimivega tujega jezika, ampak da se igrajo z novo igračo.

Igraje se učijo. Kako lepa stvar! ■

*Peter GRBEC*

*Vir: Pedagogia Revuo (2015/04)*

# Kian rolon Esperanto ludis komence de la sendependiĝo de Slovenio?
# Kakšno vlogo je igral esperanto na začetku osamosvajanja Slovenije?

Ĉar la ĉefa protagonisto de tiu ĉi rakonto d-ro Bučar, nun jam troviĝas aliflanke de la limo inter la surtera kaj eterna vivo, mi povas malfermi dosjeron de unu el la plej gravaj eventoj, kiu lanĉis la proceson ankaŭ de la fakta, ne nur dezirata procedo sendependigi Slovenion kiel propran ŝtaton.

Ko je glavni protagonist te zgodbe, dr. Franc Bučar, že na oni strani meje med zemeljskim in večnim življenjem, lahko odprem dosje enega najbolj pomembnih dogodkov, ki je sprožil proces tudi dejanskega, ne samo želenega osamosvajanja Slovenije v smislu lastne države.



*France Bučar*
*(2. 2. 1923 - 10. 10. 2015)*

D-ro Franc Bučar la unuan fojon altiris mian atenton en la 70-aj jaroj, kiam mi lin trovis kiel unu el la kunaŭtoroj de la konata almanako MEJE SPOZNANJA (La Limoj de la Kognado), kiun eldonis la katolika eldonejo Mohorjeva en Celeo (Celje). Tiun ĉi libreton, redaktita fare de inĝ. Jože Strgar, mi daŭre prenas por unu el plej gravaj libroj el la kampo de la sciencfilozofio. La sciencistoj de ĉiuj eblaj sciencaj branĉoj en tiu ĉi libro al la primitiva ŝtata ateismo en la vizaĝon diris, ke ili per sia propaganda slogano: *Ĉu la scienco ĉu la kredo – ambaŭ kune ne funkcias!* forte eraras. Tie oni povas trovi kontribuojn de filozofo, psikologo, matematikisto, fizikisto, astronomo, teknikisto, kemikisto kaj tiel ankaŭ de la sistemteoriisto d-ro Bučar. Persone ni tiam ankoraŭ ne konis unu la alian, sed lia kontribuo estis sufiĉa, ke mi lian nomon ne forgesis plu. La unuan fojon mi lin renkontis vidalvide okaze de unu el la slovenaj diskutkonferencoj "Draga" super Triesto, kie li kontribuis prelegon. Tiam ni ankaŭ povis konstati, ke ni prijuĝas la politikajn kaj ankaŭ la spiritajn aferojn tre simile, en multaj punktoj eĉ tute same. Tio estis la sloveno, probable la sola, kiu scipovis politike pensi. Kiam mi pli poste elmigris al Karintio en Aŭstrio kaj unue laboris en la redaktejo de la eldonejo Mohorjeva en Klaŭdiforumo (Celovec/Klagenfurt), kie mi ankaŭ redaktis la slovenan revuon Celovški Zvon, mi kompreneble lin tuj invitis kunlabori, kaj li fariĝis unu el la plej gravaj aŭtoroj de la politika diskurzo en la revuo.

▶

Na dr. Bučarja sem prvič postal pozoren v 70. letih, ko sem ga našel kot soavtorja znamenitega zbornika MEJE SPOZNANJA, ki ga je izdala Mohorjeva v Celju. To knjižico, ki jo je uredil dipl. inž. Jože Strgar, imam še vedno za eno najbolj pomembnih knjig s področja filozofije znanosti. Znanstveniki vseh mogočih znanstvenih vej so v tej knjigi primitivnemu državnemu ateizmu povedali naravnost v obraz, da se v svojem propagandnem geslu: *Ali znanost ali vera – oboje skupaj ne gre!* hudo motijo. Tam je mogoče najti prispevke filozofa, psihologa, matematika, fizika, astronoma, tehnika, kemika, in tako tudi sistemskega teoretika dr. Bučarja. Osebno se tedaj seveda še nisva poznala, a njegov prispevek je bil dovolj, da njegovega imena nikoli več nisem pozabil. Prvič sem ga srečal iz oči v oči na eni od tržaških "Drag", kjer je nastopil s predavanjem. Tedaj sva tudi oba ugotovila, da gledava na politične, a tudi duhovne reči zelo podobno, v mnogih rečeh kar enako. To je bil Slovenec, mogoče edini, ki je znal politično misliti. Ko sem se pozneje preselil na Koroško in najprej delal v uredništvu celovške Mohorjeve, kjer sem urejal tudi slovensko revijo Celovški Zvon, sem ga seveda takoj pritegnil k sodelovanju in je postal eden najpomembnejših avtorjev političnega diskurza v reviji.

▶

Kiamaniere la reprezentantoj de la reĝimo observis la revuon kaj mian laboron por ĝi, atestas la anekdoto ĉe la prezentado de la unua numero en la jaro 1983, kiam ni ankoraŭ naive pensis surprizi la publikon per la unua numero, ja ĝin ricevis en manjojn neniu krom kelkaj el ni, kiuj senpere super ĝi laboris, ĉu redakte ĉu en la presejo. Sed la jugoslavia sekretpolico (Udba) havis sian kanalon ankaŭ al la eldonejo Mohorjeva kaj la oficistoj de la jugoslavia generalkonsulejo en Klaŭdiforumo la enhavon de la revuo konis jam antaŭ nia prezentado. Tion konfirmis al mi la tiama generala konsulo Naberžnik. Kun glaso da ŝaumvino li alpaŝis min kaj diris en la formo de humuresprima riproĉo: "Mi vidas, ke vi pledas por la sendependa Slovenio…" kvankam en la revuo tia kontribuo rekte ne troviĝis. Mi respondis al li: "Sinjoro generala konsulo, ĉu vi opinias, ke mi prefere pledu por dependa Slovenio?" Li ridetis kaj paŝis al aliaj diskutpartneroj. Pli bonan komplimenton la revuo verdire ne povis akiri.

D-ron Bučar mi poste kiel referento por andragogia laboro enkadre de la Katolika agado plurfoje invitis al la katolika kulturdomo en Tinje/Tainach, kie li per sia prelego ĉiam denove postlasis profundan impreson pri la homo, kiu la politikon komprenas. Kelkaj reprezentantoj de la slovena politika elmigrantaro tion al mi tre resentis. Unu el ili, cetere pli privatulo ol vera reprezentanto de la elmigrintaro, iris tiel profunde, ke li vizitis mian ĉefon kaj min denuncis kaj lin petegis malebligi mian planon kaj ke oni d-ron Bučar nepre ne invitu al Karintio. Tiuokaze li eldiris kelkajn tre pezajn personajn akuzojn, sen tion argumenti per pruvoj. Mi havis bonŝancon, ke mia ĉefo pli kredis al miaj argumentoj ol al la denuncinto, kiu cetere kontraŭis la komunismon, tamen li ne estis katoliko, tiom malpli kristano. Lia kontraŭkomunismo havis karakteron de materia avido.

En tiu tempo mi havis telefonan kontakton kun kolegoj en la kroata katolika misio en Kolonjo, antaŭ ĉio kun certa s-ino Dončević. Du ĝis tri foje en la jaro ŝi havis kutimon min telefonvoki, por ke mi diru al ŝi, kio nova en Slovenio. Post la disfalo de Jugoslavio ŝi ne anoncis sin al mi plu kaj tiel mi ne scias, kio pri la institucio en Germanio, kie ŝi laboris. En la jaro 1988 unu tagon ŝi min telefonvokis per voĉo, laŭ kiu mi sentis, ke temas pri io pli serioza. Ŝi diris al mi, ke la deputito en la eŭropa parlamento por Bavario d-ro Otto von Habsburg sukcesis rezervi apartan tagon por la kroata politika demando, kaj tie kompreneble temis pri ilia klopodado atingi la ŝtatan memstariĝon, kion ili esprimis pli laŭte kaj pli klare ol slovenoj tion faris. Kaj kroatoj estis pretaj ene de tiu tago al slovenoj donaci unu paroltemon. Ŝi petis min, ke mi tiun taskon transprenu kaj iru al Strasburgo diri, kion pri tia afero opinias slovenoj, kiuj ne troviĝas flanke de la jugo-partia reĝimo. Kaze de tia invito mi konsterniĝis: Kiu do mi estas por akcepti tiel gravan taskon? Bonŝance mi en la sekva momento ricevis ideon, ke tiamaniere la afero ne povas funkcii. Mi dankis al la sinjorino pro la nobla kroata gesto, sed mi mem tion ne povas transpreni. La sinjorino insistis, dirante, ke tio donas unikan okazon, kiu eble neniam plu ripetiĝos, ke ankaŭ slovenoj al tuta Eŭropo diru, kio estas ilia politika tendenco. Mi dankis pro ŝia konfido, kiun mi pli spertis kiel por mi tro pezan ŝarĝon ol kiel komplimenton, sed mi al ŝi promesis, ke mi provos trovi iun, kiu tian aferon povus majstri kaj ke tio ankaŭ havu efikon, kian la okazo meritas. Mi provis al ŝi klarigi miajn rezervojn antaŭ fari tion mem. La unua rezervo estis en tio, ke mi ne plu vivis en mia origina hejmlando, kvankam mi tiam ne jam havis la aŭstrian ŝtatanecon. Sed la reĝimo povus mian aperon facile diskvalifiki kiel la tipe elmigranta ago, kio en certa senco formale eĉ ne estus malvero. ▶

Kako so predstavniki režima gledali na to revijo in moje delo v njej, izpričuje zgodbica s predstavitve prve številke v letu 1983, ko smo še naivno mislili, da bomo javnost presenetili z vsebino prve številke, saj je ni dobil v roke še nihče razen ti, ki smo jo delali, bodisi z urejanjem ali pa s tiskanjem. A jugoslovanska tajna policija (Udba) je imela svoj kanal tudi do Mohorjeve in je osebje jugoslovanskega konzulata v Celovcu vso vsebino revije poznalo že pred našo predstavitvijo. To mi je potrdil tedanji generalni konzul Naberžnik. S kozarcem penine je stopil k meni in mi rekel v obliki hudomušnega očitka: »Vidim, da se zavzemate za neodvisno Slovenijo…« čeprav v reviji naravnost takega prispevka še ni bilo. Odgovoril sem mu: »Gospod generalni konzul, ali menite, da naj bi se raje zavzemal za odvisno Slovenijo?« Zasmejal se je in stopil k drugim sogovornikom. Boljšega komplimenta revija pravzaprav ni mogla dobiti.

Dr. Bučarja sem potem kot referent za izobraževanje odraslih pri Katoliški akciji večkrat povabil v katoliški dom prosvete v Tinjah, kjer je s svojim predavanjem vedno znova pustil globok vtis človeka, ki politiko razume. Nekateri predstavniki slovenske politične emigracije so mi to zelo zamerili. Eden med njimi, sicer bolj zasebnik kakor resnično predstavnik emigracije, je šel tako daleč, da je obiskal mojega predstojnika in me pri njem denunciral in ga rotil, naj mi prekriža te račune in naj dr. Bučarja nikakor ne vabimo na Koroško. Pri tem je izrekal najhujše obtožbe, ne da bi pri tem postregel z enim samim dokazom. Imel sem srečo, da je moj predstojnik bolj verjel mojim argumentom, kakor pa denunciantu, ki je sicer nasprotoval komunizmu, ni pa bil niti katoličan, kaj šele kristjan. Njegov antikomunizem je bil izrazito premoženjskega značaja.

V tem času sem imel telefonski stik s kolegi v hrvaški katoliški misiji v Kölnu, predvsem z neko gospo Dončević. Dvakrat do trikrat v letu me je imela navado poklicati po telefonu, da sem ji povedal, kaj se dogaja v Sloveniji. Po razpadu Jugoslavije se ni več oglašala in tudi ne vem, kako je z ustanovo v Nemčiji, pri kateri je delala. V letu 1988 me je nekega dne poklicala z glasom, v katerem sem zaznal, da gre za nekaj resnejšega. Rekla mi je, da je poslanec v evropskem parlamentu za Bavarsko dr. Otto von Habsburg uspel rezervirati poseben dan za hrvaško politično vprašanje, in pri tem je kajpada šlo predvsem za njihovo stremljenje po državni osamosvojitvi, ki so ga izražali glasneje in bolj razločno kakor Slovenci. In Hrvati bi radi en termin tega dneva poklonili Slovencem. Mene je prosila, če bi to nalogo prevzel in šel v Strasbourg povedat, kaj glede teh reči menijo Slovenci, ki niso na strani jugo-partijskega režima. Ob takem vabilu sem se zdrznil: Kdo pa sem, da bi sprejel tako pomembno nalogo? Na srečo se mi je v hipu posvetilo, da tako to ne bo šlo. Gospe sem se zahvalil za plemenito hrvaško gesto, a sam tega ne morem prevzeti. Gospa je vztrajala, češ da je to enkratna priložnost, ki se morda nikoli več ne bo ponovila, da tudi Slovenci vsej Evropi povemo, kaj je naše politično hotenje. Zahvalil sem se ji za zaupanje, ki sem ga bolj doživljal kot zame preveliko breme, kakor pa kot kompliment, a sem ji obljubil, da bom skušal najti koga, ki bi bil taki zadevi kos in bi to tudi imelo učinek, kakršnega je priložnost vredna. Skušal sem ji razložiti svoje zadržke, da bi to storil sam. Prvi zadržek je bil v tem, da nisem več živel v domovini, čeprav tedaj še nisem imel avstrijskega državljanstva. A režim bi moj nastop zlahka diskvalificiral kot tipično emigrantsko dejanje, kar bi formalno v nekem smislu celo ne bilo neresnica. ▶

Paroli devas homo, kiu vivas meze de sia nacio kaj en ĝi ĝuas politikan reputacion, kian mi ĉiukaze ne posedas. La dua rezervo, kompreneble ne tiom grava, estis en tio, ke mi scis pri mia angla lingvo, ke ĝi sufiĉis por legi librojn, sed neniel por suverene stari antaŭ mikrofono. Mi tion estus povinta fari en la lingvo germana, sed tio ne havus la saman efikon, kiel paroli en la franca aŭ en la angla. Kiam mi ĉion-ĉi al ŝi rakontis, mi jam ankaŭ sciis, kiun mi al ŝi proponos. En konsideron povis veni unu nura nomo: d-ro Franc Bučar! Kiam mi mian proponon al ŝi menciis kaj diris kelkajn informojn pri la homo, kiun mi proponis, ŝi cedis kaj akceptis miajn argumentojn. Mi promesis al ŝi paroli kun li kaj mesaĝi, ĉu li akceptas tiun grandan taskon, kaj mi dankis pro la grandanima propono de la kroata flanko.

Voki d-ron Bučar el Labako (Ljubljana) por veni en Klaŭdiforumon, ne estis tiel simple, kiel tio estus io normala en la demokratia parto de Eŭropo. Se mi mem estus veturinta al lia adreso, kie mi plurfoje estis tre afable akceptita gasto, tio egalus al kunveni en la enketĉambro de la labaka centro de Udba, kiu siajn ejojn havis en la palaco, kiun antaŭ la milito iu riĉa urbano de Labako donacis al blinduloj. Nu, la fizike blindajn la kamaradoj post la „liberigo" elĵetis kaj enen enloĝigis la politike kaj spirite blindajn… Tiel mi simple elektis la telefonnumeron kaj invitis lin tiel, ke oni laŭeble malmulte povus aŭdi, ke temas pri io pli serioza ol eble nur pri nova kontribuo por Celovški Zvon. La politika talento de d-ro Bučar esprimiĝis ankaŭ en tio, ke li en momento komprenis, ke li devas tuj survojiĝi kaj ke li ne pridemandu plu pertelefone. Post du horoj li kaj lia filo troviĝis antaŭ nia pordo en Klaŭdiforumo. Ankaŭ tio montris, ke lia politika instinkto estis almenaŭ en tiu momento senerara. Ĉar mi sciis, ke Udba havis sian subaŭskultan kanalon ankaŭ en nia loĝbloko, kie ni tiam loĝis, mi ne invitis ilin en nian loĝejon, sed ni tuj iris promeni tra la urbo. Niatempe nun tio aŭdiĝas preskaŭ paranoje, sed tiutempe tio estis enua ĉiutagaĵo. ▶

Govoriti mora človek, ki živi sredi svojega naroda in v njem tudi ima politično reputacijo, kakršne sam vsekakor nimam. Drugi zadržek, ki je seveda manj pomemben, je v tem, da moja angleščina sicer zadošča za branje knjig, nikakor pa ne za suveren nastop pred mikrofonom. To bi lahko opravil v nemščini, a ne bi imelo enakega učinka, kakor če bi govoril v francoščini ali angleščini. Ko sem ji vse to razlagal, sem tudi že vedel, koga ji bom predlagal. V poštev je moglo priti samo eno ime: dr. France Bučar! Ko sem ji omenil predlog in ji povedal nekaj reči o človeku, ki ga predlagam, se je vdala v mojo argumentacijo. Obljubil sem ji, da bom z njim govoril in ji sporočil, ali sprejema to veliko nalogo, in se ji zahvalil za velikodušno ponudbo hrvaške strani.

Poklicati dr. Bučarja iz Ljubljane v Celovec ni bilo tako preprosto, kakor je to nekaj normalnega v demokratičnem delu Evrope. Če bi se sam odpeljal na njegov naslov, kjer sem bil večkrat nadvse prijazno sprejet gost, bi bilo enako, kakor če bi se oba sestala v zasliševalnici ljubljanskega centra Udbe, ki je imela svoje prostore v palači, ki jo je pred vojno neki bogati Ljubljančan poklonil slepim. No, fizično slepe so tovariši po »osvoboditvi« vrgli ven, vanjo pa naselili politično in duhovno slepe… Tako sem preprosto zavrtel telefon in ga povabil tako, da bi bilo čim manj mogoče slišati, da gre za kaj resnejšega, kakor morda nov prispevek v Zvonu. Politični talent dr. Bučarja se je odražal tudi v tem, da je v trenutku razumel, da mora takoj na pot in da ne sme ničesar spraševati po telefonu. Čez dve uri sta bila s sinom pred našimi vrati v Celovcu. Tudi to je kazalo, da je bil njegov politični instinkt vsaj v tistem trenutku nezmotljiv. Ker sem vedel, da ima Udba prisluškovalni kanal tudi v blok, v katerem smo tedaj stanovali, ju nisem povabil v stanovanje, ampak smo šli na sprehod po mestu. Danes se vse to sliši ali bere paranoidno, tedaj pa je bila to dolgočasna vsakdanja realnost. ▶



*Otto von Habsburg*
*(20. 11 1912 - 4. 7. 2011)*
*(vir: http://www.ottovonhabsburg.org)*

Dum nia promeno en la urbo mi klarigis al ili la aferon petante, ke li transprenu tiun taskon kaj tiel donu al slovenoj eblecon la unuan fojon politike artikuliĝi sur la nivelo eŭropa. Li estis entuziasmigita pri la okazo, sed ne, ke li tion faru. Ankaŭ li provis min persvadi, ke tion faru mi. Sed finfine li cedis sub la plej forta argumento, ke povas aŭtente paroli pri la afero slovena en la parlamento de Eŭropo nur tiu, kiu vivas en Slovenio kaj tiel transprenas ankaŭ la tutan riskon, kiu kun tio ligiĝas. Pri tio, ke ĝi por la parolanto povas finiĝi ankaŭ en malliberejo aŭ en puntendaro, kiajn la reĝimo post Tito ankoraŭ havis, ni dubis eĉ ne dum momento. Kaj tiam li eltiris argumenton, kiun mi al sinjorino Dončević diris por mi. Li diris, ke lia franca kaj angla lingvoj por tia elpaŝo ne estas sufiĉe fortaj. Kiamaniere mi lin obĵetu, ja same argumentis ankaŭ mi? Tiam subite venis la penso, kiu montriĝis decida. Mi sciis, ke antaŭ multaj jaroj d-ro Bučar estis stipendiito de Eisenhower kaj ke li studis sistemteorion en Usono. Tie li verŝajne ne parolis portugale. Tiam mi diris al li proksimume tiel: Sinjoro profesoro, ĉu vi permesas al mi vian rezervon utiligi en la libro, kiun mi ĵus verkas pri Esperanto?

Tie mi kiel la argumenton kontraŭ la paŭŝalaj asertoj, ke jam de longe la rolon, por kiu estis farita Esperanto, ludas la angla lingvo, estus mencianta vian kazon: unu el la plej alte instruitaj slovenoj, universitata profesoro, antaŭtempe stipendiito postdiploma en Usono, ne scipovas sufiĉe la anglan por povi en Strasburgo rakonti, kiel slovenoj finfine jam volas akiri propran ŝtaton… Tiam la profesoro frapis sian genuon kaj ekridis: Nun vi min trovis… Precize surbaze de tiu ĉi argumento li poste sen plua diskutado akceptis la inviton kaj konfirmis, ke li estas preta veturi al Francio kaj fari sian laboron. La libron pri Esperanto mi efektive verkis kaj iom pli poste ĝi aperis sub la titolo Pojasnilo prijateljem o esperantu (Klarigo al Amikoj pri Esperanto). La kazon de d-ro Bučar mi en la libron ne povis preni, ja li surbaze de tiu ĉi "minaco" la aferon sen plua hezito akceptis kaj la senditecon tre efike efektivigis.

Kiam li el Strasburgo revenis, li veturis tra Aŭstrio kaj haltis en Klaŭdiforumo. Nun, kiam la afero jam pasis, mi lin kaj lian filon invitis en nian loĝejon, kaj nun li rakontis al mi la tutan aventuron de sia vojo. Tien li kun sia filo veturis tra Triesto. Malgraŭ sia genia politika sento, sia plurfoje demonstrita racieco, li tamen ne povis prikaŝi, tamen esti sloveno. Sian en la franca skribitan paroladon li simple metis en la internan poŝon de sia jako kaj tiel survojiĝis, kvazaŭ li havus intencon prelegi al la abelistoj de Triesto pri la slovena abelista pioniro Janša. Oni povas imagi, kiom da vino en tiu vespero la fraŭloj en la sidejo de Udba en Labako estus konsumintaj, se la dogana milicano tiun ĉi paroladon estus trovinta kaj elmaniginta al tiuj, kiuj kompreneble devus alvoki tradukiston. Sed certa forto volis, ke la slovena parolisto venu kun tiel aŭdaca kaj preskaŭ senresponse naive "kaŝita" kontrabandaĵo preter la okuloj de arguso de la slovena dogana milicanaro. Li estis savita per tio, ke li kunprenis en sia monujo iom da germanaj markoj super la permesita sumo. Kaj pro tio la milicanoj duonan horon baraktis per tiu mono kaj tiel simple forgesis kontroli lian jakon kaj tiel elprni la paroladon, kiu jam post kelkaj horoj lanĉis en Slovenio veran politikan tertremon. Kaj la tertremon tuj postsekvis ankaŭ la kanonado de la plej akraj politikaj kondamnoj kaj juraj minacoj. La plitikaj granduloj de tiu tempo – kelkaj certe partoprenis lian sepulton antaŭ nelonge kaj levas lian nomon nun inter la stelojn – lin kondamnis per akuzo esti nacia kaj ŝtata grandperfidulo. Se la paroladon ne estus aŭdinta la tuta politika kaj kultura Eŭropo, li tion certe devus pagi per fortaj reprezalioj. ▶

Med sprehodom po mestu sem jima razložil zadevo in ga prosil, da prevzame to nalogo in tako da Slovencem možnost, da se prvič politično artikulirajo na evropski ravni. Bil je navdušen nad to možnostjo, a nikakor ne, da bi to opravil on. Tudi on me je skušal prepričati, naj to storim jaz. Nazadnje je klonil pred najmočnejšim argumentom, da lahko verodostojno govori o slovenski zadevi v evropskem parlamentu samo kdo, ki živi v Sloveniji in tako sprejema nase tudi vse tveganje, ki je s tem povezano. O tem, da se to utegne za nastopajoče končati tudi v zaporu ali kakem taborišču, ki jih je režim po Titu še vedno imel, nisva dvomila niti za trenutek. Potem pa je on izvlekel argument, ki sem ga gospe Dončevićevi povedal tudi zase. Rekel je, da sta njegova francoščina in angleščina prešibki za tak nastop. Kako naj bi mu oporekal, ko pa sem enako argumentiral dan prej tudi sam? Tedaj mi šine misel, ki se je izkazala za odločilno. Vedel sem, da je bil dr. Bučar pred davnimi leti Eisenhowerjev štipendist in je nekaj časa študiral sistemsko teorijo v ZDA. Tam najbrž ni govoril portugalsko. Tedaj sem mu rekel nekako tole: Gospod profesor, ali smem vaš pomislek uporabiti v knjigi, ki jo ravno pišem o esperantu?

Tam bi kot argument proti pavšalnim trditvam, kako že davno vlogo, za katero je bil narejen esperanto, igra angleščina, navedel vaš primer: eden najbolj izobraženih Slovencev, univerzitetni profesor, nekoč postdiplomski študent v Ameriki, ne zna dovolj angleščine, da bi v Strasbourgu povedal, kako bi Slovenci končno že radi dobili lastno državo… Tedaj se je profesor udaril po kolenu in se zasmejal: Zdaj ste me pa našli… Natanko na osnovi tega argumenta je potem brez nadaljnje diskusije sprejel ponudbo in potrdil, da se je pripravljen odpeljati v Francijo in opraviti to delo. Knjigo o esperantu sem dejansko pisal in je malo pozneje tudi izšla pod naslovom: Pojasnilo prijateljem o esperantu. Primera dr. Bučarja v knjigo nisem mogel vključiti, ker je na osnovi te »grožnje« stvar brez pomišljanja sprejel in poslanstvo zgledno in na moč učinkovito opravil.

Ko se je iz Strasbourga vračal, se je peljal skozi Avstrijo in se ustavil v Celovcu. Zdaj, ko je bila stvar mimo, sem njega in sina povabil v naše stanovanje, in potem mi je pripovedoval celotno avanturo svoje poti. Tja se je s sinom peljal skozi Trst. Kljub svojemu genialnemu političnemu čutu, svoji večkrat razodeti racionalnosti, pa vendar ni mogel zatajiti, da je Slovenec. Svoj v francoščini napisan govor je preprosto vtaknil v suknjič in tako šel na pot, kakor da bi se namenil predavati tržaškim čebelarjem o slovenskem čebelarju Janšu. Človek si lahko predstavlja, koliko vina bi tisti večer popili fantje na sedežu Udbe, ko bi mu carinski miličnik našel ta govor in ga izročil v branje tistim, ki bi si seveda morali dati privesti prevajalca. A neka moč je hotela, da pride slovenski govornik s tako drzno in skoraj neodgovorno naivno »skrito« prtljago mimo argusovih oči slovenske obmejne milice. Rešilo ga je to, da je imel v denarnici nekaj nemških mark več denarja, kakor ga je bilo dovoljeno nesti čez. Potem so se kake pol ure ukvarjali s tem denarjem in pri tem pozabili preprosto seči v žep njegovega suknjiča in izvleči govor, ki bo že čez nekaj ur sprožil v Sloveniji pravi politični potres. Potresu pa je hipoma sledila tudi kanonada najostrejših političnih obsodb in pravnih groženj. Politični veljaki tistega časa – nekateri so se gotovo udeležili njegovega nedavnega pogreba in ga danes kujejo v zvezde – so ga obsodili za narodno in državno veleizdajo. Če tega govora ne bi slišala vsa politična in kulturna Evropa, bi to gotovo plačal s hudimi represalijami. ▶

Ĉiukaze li transnokte fariĝis persona non grata, ne nur politike, ankaŭ socie li estis mortigita. Kaj tamen oni devas danki ĝuste tiun paroladon de d-ro Bučar, ke la procedo komencis disvolviĝi kaj baldaŭ venis la efektivigo de tio, kion li tie diris. La slovena sendependiĝo certe ne havas unu nuran patron, kvankam nuntempe tiaj patroj volas esti ankaŭ la viroj, kiuj eble estis perfortuloj kaj ne veraj patroj. Sed la ŝlosilan signifon havis ĝuste la suverena, klara kaj decidiĝa elpaŝo de d-ro Bučar en Strasburgo.

Spite la korproksiman rilaton, kiu tuttempe regis inter ni du, spite tiomajn komunajn tagmanĝojn en lia simpla loĝejo en Labako, kie li plurfoje mem kuiris, pri la politikaj aferoj ni ne havis ĉiam la saman opinion. Estis kazoj, kiam inter nin falis ombro, kiel ekzemple dum la komenca fazo de la Slovena Mondkongreso, por kies starto mi donis iniciaton okaze de Draga kaj laboris dum kelkaj jaroj kiel la sekretario de la prepara komitato. Finfine mi estis eliminita per ruzaĵo, ĉar mi tuttempe pledis por la juda modelo de la institucio, kiu sian sidejon havas ekster la ŝtata teritorio, ĉar ĝuste tio faras la poenton de la strukturo, kaj li tiam paŝis al la flanko de tiuj, kiuj kiel la lastaj ensaltis la veturantan trajnon kaj mi estis antaŭ liaj okuloj demandita, de kie mi venis kiel paraŝutisto en la kongresan preparkomitaton. Kiam la afero estis forgesita, mi vizitis lin ankoraŭ kelkajn fojojn en lia hejmo kaj ni havis belajn interparolojn, ankaŭ pri la fido, ja mi sciis, ke ankaŭ li havas sindromon de la agadisma kompreno de la kristana kredo laŭ la modelo de Kocbek, kiu volas la mondon ripari, kiu volas enverŝi novan vinon en malnovajn ujojn, kiel Jesuo diris. Kun intereso li sekvis la aferojn, kiujn mi al li alportis; sed kiam li fariĝis prezidanto de la slovena parlamento, mi pro konsidero ne volis lin ĝeni kaj tiel niaj kontaktoj estingiĝis.

Nuntempe mi min mem demandas, ĉu mi procedis ĝuste. Ne per tio, ke mi peris la pilkon al tiu, kiu vere povis ŝuti en golon, tion mi certe ne bedaŭras, tio estis la sola utila kaj racia decido, kiun mi en tiu momento povis fari. Mi pensas pri tio, ĉu mi procedis ĝuste, ke mi aliĝis al la eŭforia klopodado por malligi Slovenion disde Jugoslavio, kiel tion singarde nomas la unua ĝia prezidanto Milan Kučan. Nuntempe mia kriterio pri ĉiuj aferoj tamen estas tio, kion la Biblio diras, kaj ne la publika opinio aŭ la opinio de miaj amikoj aŭ de mi mem. Ĉu Kristo pledis por malligi Judeon disde la Roma Imperio? Kaj tamen la serba superpovo estis infana ludo kompare kun la superpovo de Romo. Ne, ja lia regno, kiel li diris al Pilato, ne estas de tiu ĉi mondo. Kaj por ĉiu, kiu postiras lin, validas la samo. Kristano estas lojala al ĉiu povo, li mem ludas bonan, honestan ludon kaj ne konsideras tion, kiamaniere ludas la povo, ja li kredas, ke ĝi estos juĝita kaj ke nenio malbona povas eskapi la juĝon. Tiel mi nuntempe bedaŭras mian tiaman kontraŭadon al Jugoslavio kaj ĝia reĝimo, kvankam tio estis ene de la limoj de humanisma elpaŝo sen uzo de perforto aŭ eĉ nur sugestado por ke aliaj uzu la perforton. Ne pro tio, ke mi nuntempe Jugoslavion kaj ĝian reĝimon havus por io bona, sed pro tio, ke ankaŭ tiu povo al ni estis donita de Dio; al kelkaj por ilin puni, aliaj por ricevi elprovon, al aliaj por pliboniĝi, sed al ĉiuj kiel la juĝo de Dio, kontraŭ kiu ne troviĝas kontraŭdiro. Tio ne signifas, ke mi nuntempe devus praktiki nostalgion post la reĝimo, kiu estis fundamentita sur mensogoj, trompoj, raboj kaj perforto, kvankam tie kaj tie estis faritaj ankaŭ bonaj aferoj, kiel tio validas por ĉiuj reĝimoj de ĉiuj tempoj. Sed kiam oni tiun ĉi rekonon ricevas kaj ĝin akceptas, tiam oni kondutu al la povo senkonsidere, kia ĝi estas, kiel la Filo de Dio mem kondutis, kaj kiel kondutis la apostolo Paŭlo kaj liaj apostolaj kamaradoj. ■

*Vinko Ošlak*
*En Klaŭdiforumo, 2016*

Vsekakor pa je čez noč postal persona non grata, ne samo politično, tudi družbeno mrtev. In vendar se je prav temu Bučarjevemu govoru treba zahvaliti, da so se stvari začele odvijati in je kmalu prišlo do uresničenja tega, kar je tam povedal. Slovenska samostojnost gotovo nima enega samega očeta, čeprav se danes za očetovstvo potegujejo tudi možje, ki so bili kvečjemu posiljevalci, ne pa pravi očetje. A ključnega pomena je bil prav Bučarjev suveren, jasen in odločen nastop v Strasbourgu.

Kljub prisrčnemu odnosu, ki je ves čas vladal med nama, kljub tolikim skupnim obedom v njegovem preprostem stanovanju v Ljubljani, kjer je večkrat bil kuhar kar sam, se glede političnih reči nisva vedno strinjala. Kdaj je padla med naju tudi senca, kakor v začetni fazi Svetovnega Slovenskega Kongresa, pri katerem sem bil kot pobudnik konkretnega začetka na Dragi in kot nekajletni tajnik pripravljalnega odbora, nazadnje izigran, saj sem ves čas zagovarjal judovski model te ustanove, ki ima središče zunaj narodnega in državnega telesa, kar je ravno poanta te strukture, on pa je tedaj stopil ob bok tistim, ki so zadnji skočili na ta vlak in me potem pred njegovimi očmi vprašali, od kod sem se vzel. Ko je bila zadeva pozabljena, sem ga še večkrat obiskal na domu in sva imela lepe pogovore, tudi o veri, saj sem videl, da tudi on boluje za Kocbekovo »boleznijo« krščanstva, ki hoče popravljati ta svet, ki hoče novo vino nalivati v stare mehove, kakor pravi Jezus. Z zanimanjem je sledil stvarem, ki sem mu jih prinašal; ko pa je postal predsednik slovenske Skupščine, ga iz obzirnosti nisem hotel nadlegovati in so se tako najini stiki prekinili.

Danes vprašujem samega sebe, ali sem ravnal prav. Ne v tem, da sem podal žogo tistemu, ki je v resnici mogel zabiti gol, tega gotovo ne obžalujem, to je bilo edino koristno in pametno, kar sem v tistem trenutku mogel narediti. Mislim na to, ali sem ravnal prav, da sem se pridružil evforičnemu zavzemanju za razdružitev Slovenije od Jugoslavije, kakor to previdno imenuje prvi predsednik Milan Kučan. Danes je namreč moj kriterij v vseh rečeh to, kar pravi Biblija, ne pa javno mnenje ali mnenje mojih prijateljev ali moje mnenje. Se je Kristus zavzemal za »razdružitev« Judeje od Rimskega imperija? Pa je bila srbska nadoblast otroška igra v primerjavi z nadoblastjo Rima. Ne, saj njegovo kraljestvo, kakor je povedal Pilatu, ni od tega sveta. In za vsakega, ki res hodi za njim, velja enako. Kristjan je lojalen do vsake oblasti, sam igra dobro, pošteno igro, in se ne ozira na to, kako igra oblast, saj veruje, da ji bo sojeno in se nič zlega sodbi ne bo izmaknilo. Tako danes obžalujem svoje tedanje nasprotovanje Jugoslaviji in njenemu režimu, čeprav je bilo v mejah humanističnega nastopanja brez uporabe sile ali tudi le nagovarjanja k nasilju. Ne zato, ker bi ju danes imel za kaj dobrega, pač pa zato, ker nam je tudi tista oblast bila dana od Boga; nekaterim v kaznovanje, drugim v preizkušnjo, tretjim v poboljšanje, vsem pa kot Božja sodba, zoper katero pri kristjanu ni ugovora. To pa ne pomeni, da bi danes moral zganjati nostalgijo po režimu, ki je temeljil na lažeh, prevarah, ropu in nasilju, čeprav je bilo tu in tam kdaj narejeno tudi kaj dobrega, kakor to velja za vse režime vseh časov. A ko človek to spoznaje prejme in ga sprejme, se vede do oblasti, ne glede na to, kakšne so, kakor se je vedel Božji Sin sam, kakor se je vedel apostol Pavel in njegovi apostolski tovariši. ■

*Vinko Ošlak*
*V Celovcu, 2016*

# Michel Duc-Goninaz
## 1933 - 2016

La mortintan profesoron Duc-Goninaz mi persone tre bone konis, ni estis kolegoj ĉe la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, ni plurfoje gvidis seminariojn, li pri lingvistiko, mi pri filozofio. Li estis kazo de nobla, escepte erudita kaj samtempe simpla, honesta homo. Ni kunlaboris ankaŭ ĉe lia revizia laboro por nova PiV, kie mi kontribuis filozofiajn terminojn, kiuj en antaŭaj eldonoj ne jam troviĝis. En tiu senco mi ankaŭ respondis al la delegito por Francio je lia afabla oferto. La libroj estas jam longe eksmodaj kaj nun ne plu uzeblaj. Eble tamen iu sin anoncos por havi la librojn. Tre ĝentila gesto.



Morto de esperantisto de tia rango daure estas aparte trista afero ankaŭ pro tio, ke la bibliotekoj de tiaj homoj, precipe la esperanta parto, kutime trovas sian finon en rubaĵujo. Mi mem zorgis, ke almenau la pliparto el mia esperanta biblioteko estu savita, ĉar mi ilin donacis al la andragogia instituto MOCIS en Slovenburgo. Momente ili estas bele aranĝitaj en aparta libroŝranko, sed oni ne povas scii, kio okazos en estonto. Estus pli bone, se la slovena Nacia kaj Universitata Biblioteko je tiaj kazoj malfermus apartan deponejon, por ke ĉiuj slovenaj esperantistoj almenau post sia morto povus disponigi siajn librojn al la publika uzo, ke ili ne trovu malhonoran finon. Eble la Universitata Biblioteko de Mariburgo povus kapti la ideon?

*Vinko Oŝlak*

Pokojnega profesorja Duc-Goninaza sem osebno zelo dobro poznal, bila sva kolega pri Mednarodni akademiji znanosti v San Marinu in sva večkrat hkrati imela seminarje, jaz za filozofijo, on za jezikoslovne teme. Bil je primer plemenitega, izredno učenega, a hkrati preprostega, dostojnega človeka. Sodelovala sva tudi pri njegovi prenovi Plena Ilustrita Vortaro, kjer sem prispeval filozofsko terminologijo, kolikor je v prejšnjih izdajah še ni bilo. V tem smislu sem tudi odgovoril naravnost delegatu za Francijo na njegovo prijazno ponudbo. Knjige so seveda že davno zastarele in danes neuporabne. Mogoče pa se kdo vendar oglasi, da bi knjige imel. Zelo obzirna poteza.

Smrt esperantista takega ranga je vedno še posebej žalostna tudi zaradi tega, ker knjižnice takih ljudi, predvsem esperantski del, navadno končajo v koših za odpadke. Sam sem pri sebi poskrbel, da bo vsaj večji del iz moje esperantske knjižnice rešen, ker sem jih poklonil MOCIS-u v Slovenj Gradcu. Zaenkrat jih imajo lepo shranjene v posebni omari, kako bo za naprej, pa ni mogoče vedeti. Bolje bi bilo, če bi NUK za take primere odprl poseben depo, da bi lahko vsi slovenski esperantisti svoje knjige vsaj po smrti prepustili javni uporabi in ne bi žalostno končale. Mogoče bi idejo zgrabila Mariborska univerzitetna knjižnica?

*Vinko Oŝlak*

*Michel Duc Goninaz (6 septembro 1933 - 26 marto 2016) estis franca esperantisto konata tutmonde pro sia revizio (en 2002) de La Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (angle: Compl ete Illustrated Esperanto Dictionary .*

*Membro de la Tutmonda Esperanto Junulara Organizo dum la 1950aj jaroj, li funkciis kiel kunredaktoro de La Folieto, distribuita plejparte inter junaj esperantistoj de Francio.*

*En 1956 li geedziĝis kun Arlette Lecourtois. Li rolis en la Esperantlingva unuhora filmo Angoroj, filmita en 1964.*

*Precipe, li kompilis Vocabulaire Espéranto (Lautema Esperanta-franca vortareto), teman Franc-Esperantan vortaron publikigitan de Ophrys en 1971 (dua eldono, 1990), kaj li adaptis teatraĵon de Aleksandr Puskin La Ŝtona Gasto. Li ankau tradukis "La Fremdulon" de Albert Camus kaj "Songhan rakonton" de Arthur Schnitzler en Esperanton. Dum multaj jaroj li estis preleganto en la rusa kaj Esperanto ĉe la Universitato de Provenco). Duc Goninaz estis preleganto ĉe la Internacia Akademio de Sciencoj (Academy of Sciences) en San Marino kaj regule kontribuanta redaktoro en la Esperantlingva revuo Monato.*

*En 2002, li kaj Claude Roux ĝisdatigis kaj reviziis La Plenan Ilustritan Vortaron de Esperanto, unulingvan referencvortaron de esperanto de Gaston Waringhien kiu estis origine publikigita en 1976. En 2002 la ĵurnalo*

*La Ondo de Esperanto nomis Duc Goninaz "Esperantisto de la Jaro" kiel rekono al lia laboro kiel ĉefredaktoro de la vortarrevizio. Okaze de la dua reviziita eldono (2005) korektis multajn tipografajn erarojn gramatikisto kaj leksikografo Bertilo Wennergren.*

# Sukcesa Trilanda Kongreso de esperantistoj en Indonezio
# Upešen kongres esperantistov treh držav v Indoneziji

*Selamat datang di kongres Esperanto Tiga Negara pertama!*

Bonvenon al la trilanda kongreso de Esperanto!

Kun tiuj vortoj la tri Esperanto-asocioj bonvenigis 101 partoprenantojn, inter ili 40 eksterlandanojn. Kiam la Aŭstralianoj, Indonezianoj kaj Novzelandanoj decidis okazigi la trilandan kongreson post 14 monatoj, ni hezitis kaj - kompreneble - hezitis kaj timis malsukceson. Sed finfine ni povis rikolti kaj ĝui la fruktojn de niaj penoj.




AEA (Australia Esperanto-Asocio) kaj NZEA (Novzelanda Esperanto-Asocio) subtenis la kongreson finance kaj praktike. Inverse IEA (Indonezia Esperanto-Asocio) helpis allogi kelkajn esperantistojn de Aŭstralio, kiuj ĝis nun ne partoprenas naciajn aranĝojn.

Venante el lando, kie la plejparto de esperantistoj estas maljunaj kiel en Australio, la granda nombro de junaj, viglaj studentoj en Indonezio donis pli da espero. Havi tri landojn kaj multe da eksterlandanoj kreis multe pli internacian etoson ol nur nacia kongreso.

La programo estis enhavriĉa. Okazis kursoj por komencantoj kaj progresintoj, prezentadoj pri vulkanoj en Aŭklando, la pejzaĵoj, flaŭro kaj faŭno en Aŭstralio, variaj, interesaj prelegoj de junaj indonezianoj, ekzemple pri orangutanoj, kafo de Javapreanger, la historio de gamelan kaj la eldono de libroj en Indonezio.

Juna, energplena repkantisto Jonny M el Germanio fariĝis tre populara inter la junaj kaj eksterlandaj junuloj. Li koncertis 2-foje ĉe la kongresejo kaj antaŭ la ne-esperantista publiko. Per lia muziko, Jonny M montris ke Esperanto ne nur estas lingvo sed ankaŭ ĝi kreas sian kulturon pere de diversaj talentoj de esperantistoj en artoj, literaturoj, kaj tiel plu.

Donante ŝancon al la kongresanoj por plikonatiĝi kun la lando, homoj kaj la kulturoj, ni organizis antaŭkongresan, tuttagan kaj postkongresan ekskursojn. Tiam la kongresanoj spertis novajn aferojn kiuj ili eble neniam faras ĉe siaj landoj. Ekzemple ili lernis fari 'batik' kiel unu el indoneziaj heredaĵoj, ludis tradician muzikilon de bamboo kiu nomiĝas 'angklung' kaj vizitis grandegan templon de Borobudur kiu estas mondheredaĵo laŭ la UNESCO. ▶

*Selamat datang di kongres Esperanto Tiga Negara pertama!*

Dobrodošli na esperantskem kongresu treh držav!

S temi besedami so tri esperantske zveze izrekle dobrodošlico 101 udeležencu, med njimi 40 tujcem. Ko smo se Avstralci, Indonezijci in Novozelandci odločili izvesti kongres treh držav, smo se po 14 mesecih obotavljali in – razumljivo – obotavljali zato, ker smo se bali neuspeha. Toda končno smo lahko poželi in uživali sadove našega truda.

AEA (Avstralska esperantska zveza) in NZEA (Novozelandska esperantska zveza) sta podprli kongres finančno in praktično. Nasprotno je IEA (Indonezijska esperantska zveza) pomagala privabiti nekatere avstralske esperantiste, ki se do sedaj niso udeleževali nacionalnih prireditev.

Ko so prišli v državo, kjer je večina esperantistov starejših, kot je Avstraliji, je veliko število mladih, živahnih študentov v Indoneziji prineslo več upanja. Tri države in veliko tujcev ustvari veliko več mednarodne etike kakor samo nacionalni kongres.

Program je bil bogat. Izvajali so se tečaji za začetnike in napredne, predavanje o vulkanih v Aucklandu, o pokrajini, rastlinah in živalih Avstralije, različna zanimiva predavanja mladih Indonezijcev, na primer o orangutanih, kavi iz Javapreangerja, zgodovini indonezijskega orkestra in izdajanju knjig v Indoneziji.

Mlad, energičen raper Jonny M iz Nemčije je postal med mladimi domačini in tujci zelo popularen. Nastopil je dvakrat, na kongresu in pred neesperantsko publiko. S svojo glasbo je Jonny M pokazal, da esperanto ni samo jezik, ampak tudi ustvarja svojo kulturo z različnimi talenti esperantistov v umetnosti, literaturi itd.

Da bi udeležence kongresa seznanili z državo, ljudmi in kulturo, smo organizirali predkongresne, celodnevne in pokongresne izlete. Takrat so udeleženci kongresa izkusili nove zadeve, ki jih najbrž ne bi nikoli v svojih državah. Na primer naučili so se izdelovati "batik" kot ene od indonezijskih dediščin, igrati na tradicionalni instrument iz bambusa, ki se imenuje "anklung" in obiskali ogromen tempelj Borobudur, ki je svetovna dediščina po UNESCO-u. ▶




*Partoprenantoj de la Trilanda kongreso* | *Udeleženci Kongresa esperantistov treh dežel*

Dum la ekskursoj, kelkaj kongresanoj spertis kulturan ŝokon tamen ili konsideris la aferojn kiel neforgesema sperto kaj klopodis adaptiĝi. Ekzemple pri aferoj rilate al necesejoj, manĝaĵoj, trafiko kaj lokaj kutimoj.

En tiu ĉi kongreso, granda avantaĝo estis ke la loka Esperanto-grupo de Bandung havas fortajn ligojn kun la loka Azio-Afrika Konferenca Muzeo en la urbo. La malferma ceremonio okazis tie kaj ĉeestis reprezentantoj de kelkaj universitatoj. Ni ankaŭ ĝuis la "*Nokton en la Muzeo*" diskonigante la flugfolion de Esperanto en Indonezio al la vizitantojn de la muzeo.

En sudorienta Azio ne abundas esperantistoj kaj tiu trilanda kongreso povas servi kiel modelo por venontaj eventoj en la regionoj. Precipe por junaj Indonezianoj, la trilanda kongreso jam donis bonan okazon por renkonti eksterlandajn samideanojn kaj sperti la amikecan etoson. Pro tio, plejparte ili reakiris la motivon por plulerni la lingvon kaj disvastigi ĝin al siaj amikoj kaj konatuloj. Krom tio tiuj junuloj povis ekkonatiĝi kun samlandanoj kiuj venis de diversaj urboj kaj interparolis pri siaj spertoj en esperantujo kaj aliaj aferoj.

Ni ankaŭ estis tre bonŝancaj havi du UEA estrarajn inter ni. Stefan MacGill gvidis la 21-an AMO seminarion kaj Lee Jungkee *Ŝlosilon*. AMO seminario kiu estas trejnado de aktivulo celas maturigi la kapablon por pli efike agadi kaj propagandi Esperanton. ▶

Med izleti so nekateri udeleženci kongresa izkusili kulturni šok, vendar so zadevo smatrali kakor nepozabno izkušnjo in se skušali prilagoditi. Na primer zadeve glede WC, hrane, prometa in lokalnih običajev.

Na tem kongresu je bila velika prednost ta, da ima lokalna esperantska skupina iz Bandunga močne povezave z lokalnim muzejem azijsko-afriške konference. Tukaj je potekala otvoritvena slovesnost, ki so ji prisostvovali predstavniki številnih univerz. Uživali smo tudi “Noč v muzeju”, ko smo delili letake o esperantu v Indoneziji obiskovalcem muzeja.

V jugovzhodni Aziji esperantisti niso številni in kongres treh držav lahko služi kot model za prihodnje dogodke v regiji. Še posebej za mlade Indonezijce je kongres treh držav že dal dobro priložnost za spoznavanje tujih somišljenikov v prijateljskem vzdušju. Večina njih je spet dobila razlog za nadaljnje učenje jezika in njegovo širjenje med svoje prijatelje in znance. Poleg tega se ti mladi spoznavajo z rojaki, ki so prišli iz različnih mest in se pogovarjajo o svojih izkušnjah v esperantu in drugih zadevah.

Prav tako smo bili zelo srečni, da smo imeli med nami dve vodji UEA. Stefan MacGill je vodil 21 AMO seminar in Lee Jungkee *Ključ*. AMO seminar je trening aktivistov s ciljem izboljšati sposobnost za učinkoviteje delovanje in spodbujanje esperanta. ▶

La seminario estis dividitaj en kvin sesioj kaj prezentitaj laŭ temoj rilate al lernando de Esperanto en Azio. En la fino de la sesio, ni konkludis la rezulton en ok rekomendoj kaj unu el ili estis daŭrigo de kunlaborado inter tri landoj por 2-a trilanda kongreso.

Konstante ĝi memorigu nin pri la situacio en Azio kaj speciale en Sudorienta Azio kaj la graveco de ĉi-tiu kongreso, kune kun *Ŝlosilon* (Lee Jungkee), la tri landaj asocioj taksis la kongreson bona atingo kaj sukceso. Ni decidis okazigi la duan trilandan kongreson en 2018 inter la 28-a de marto kaj 2-a de aprilo 2018 en Bandung en Indonezio. ■

*Ilia Dewi*
ilia.dewi@gmail.com




Seminar je bil razdeljen na pet sej in predstavljen v skladu z zanimivimi temami, povezanimi z učenjem esperanta v Aziji. Na koncu zasedanja, smo zbrali rezultate v osmih priporočilih, in eden od njih je bilo nadaljevanje sodelovanja med tremi državami za 2. kongres treh držav.

Nenehno smo se spominjali razmer v Aziji, predvsem v jugovzhodni Aziji in pomena tega kongresa. Skupaj s *Ključem* (Lee Jungkee), so tri nacionalna združenja ocenila kongres kot dober dosežek in uspeh. Odločili smo se, da bo drugi kongres treh držav v letu 2018 med 28. marcem in 2. aprilom 2018 v Bandungu v Indoneziji. ■

*Ilia Dewi*
ilia.dewi@gmail.com

## Ilia Sumilfia Dewi



*Naskiĝis en Ĝakarto la 11an de marto 1978.*

*Ŝi komencis lerni Esperanton en la unua Duono de la jaro 2009 pere de mallonga Enkonduko al Esperanto kun esperantistino el Belgio, Heidi Goes.*

*Poste kun siaj geamikoj kiuj antaŭe jam lernis kune Esperanton, ŝi starigis Esperanto-grupon por lerni kune Esperanton en iu magazeno en Ĝakartoĝ gis oktobro, 2 010 kiam la klubo Esperanto de Ĝakarto "Esperiga Suno" fondiĝis, kiu estas la unua Esperanto-klubo en Indonezio. En deecembro 2010, ŝi havis la ŝancon partopreni Esperantan eventon eksterlande kiu estis Komuna Seminario ( KS28) inter 4 landoj: Vjetnamio, Ĉinio, Japanio kaj Koreio en Hanoi (Vjetmanio).*

*Poste ŝi havis eblecon por reprezenti Indonezion por la unua fojo ĉe Universala Kongreso (La 95a UK) en Kopenhago, Danio en 2011. En tiu tempo,ŝi ankaŭ partoprenis kelkan aliajn eventojn en Eŭropo kiel SES (Somera Esperanto-Studo) en Slovakio, Kristanan Esperanto-kongreson en Ĉeĥio kaj Italan Kongreson en Torino, Italujo.*

*En 2013, ŝi estis la prezidanto de LKK por la 1a Indonezia Esperanto-kongreso kiu okazis en Bogor. Tiam ŝi fariĝis la prezidanto de IEA (Indonezia Esperanto-Asocio) ekde 2013 20 16.*

*En la komenco de 2015,ŝi plenumis la inviton de AEA (Aŭstralia Esperanto-Asocio) por partopreni Aŭstralian Esperanto-kongreson en Melburno.*

*En 2016, nome de IEA, ŝi kunlabore kun AEA, NZEA okazigis la Trilandan kongreson kiu ankaŭ estis subtenata de Bandunga E-klubo kaj Azia Afrika muzeo, en Bandung.*

*Nuntempe, krom kontribui kiel gvidanto de Ĝakarta E-klubo, ŝi ankaŭ prenis rolon kiel prezidanto.*

*Rojena v Džakarti 11. marca 1978*

*Začenjala je spoznavati esperanto na polovici leta 2009 s kratkim uvajanjem v esperanto z esperantistko iz Belgije, Heidi Goes.*

*Za tem je s svojimi prijatelji, ki so se že prej skupaj učili esperanta, ustanovila esperantsko skupino, da bi se skupaj učili esperanto v nekem skladišču v Džakarti do oktobra 2010, ko je bi ustanovljen klub "Esperiga suno" v Džakarti, ki je prvi esperantski klub v novem esperantskem gibanju v Indoneziji. Decembra 2010 je imela prvo priložnost za sodelovanje na esperantski prireditvi v tujini, to je na Skupnem seminarju (KS-28) štirih držav: Vietnama, Kitajske, Japonske in Koreje v Hanoju (Vietnamu).*

*Nato je imela priložnost, da prvič zastopa Indonezijo na Svetovnem kongresu (95. kongres) v Kopenhagnu na Danskem leta 2011. V tem času je tudi sodelovala pri nekaj drugih dogodkih v Evropi, kot je SES (Somera Esperanto Studo) na Slovaškem, krščanskem esperantskem kongresu na Češkem in italijanskem kongresu v Torinu v Italiji.*

*Leta 2013 je bila predsednica organizacijskega odbora za 1. indonezijski esperantski kongres, ki je potekal v Bogorju. Takrat je postala predsednica IEA (Indonezijske esperantske zveze) za obdobje 2013-2016. V začetku leta 2015 je na povabilo AEA (Avstralskegaa esperantskega združenja), sodelovala na avstralskem esperantskem kongresu v Melbournu.*

*V letu 2016 je v imenu IEA sodelovala z AEA, NZEA pri pripravi kongresa treh držav, ki je tudi podprl esperantski klub v Bandungu in Azijsko-afriški muzej v Bandungu.*

*Trenutno je, poleg vodenja E-kluba v Džakarti, tudi predsednica IEA začasna predsednica IEA za nedoločen čas.*

# 6-a Monda Pupfestivalo
# 6. svetovni festival lutk

Dum la 6-a Monda Pupfestivalo estos montrataj proksimume 1.500 pupoj el 71 landoj, inkluzive 4 el Slovenio, ĉiuj portantaj la tradiciajn kostumojn de la originaj landoj. De 2014 estas inkludita ankaŭ Esperantolando kun pupoj senditaj de Esperantistoj el la tuta mondo.

La evento okazos de la 28-a ĝis la 30-a de oktobro ĉe Izutsu Yashiki (769-2901 Higashikagawa, Hiketa 2163, Japanio; Tel. +81 879-238557).

La 6-a Monda Pupfestivalo estas dediĉita al Germanio. Tiam estos montrataj lignaj fumpupoj mane faritaj, nukskrakantoj, kristnaskaj piramidoj, pupdomoj, ktp. La Ambasado de Germanio, la Germana Domo en Urbo Naruto kaj la Japana-Germana Asocio de Kagawa aŭspicias la eventon.

La kulturan programon kompletigos prezentado de la 9-a Simfonio de Betoveno. Lokaj restoracioj ofertos vastan gamon de internaciaj pladoj.

Pliaj informoj estas troveblaj ĉe http://world-doll-festival.org/ ■

*Etsuo Miyoshi*
*Prezidanto, Komitato de la Monda Pupfestivalo*

Med 6. svetovnim lutkovnim festivalom bo prikazanih približno 1.500 lutk iz 71 držav, vključno s štirimi iz Slovenije. Vse bodo nosile tradicionalne kostume držav iz katerih prihajajo. Od leta 2014 je vključena tudi "Esperantolando" z lutkami, ki jih pošljejo esperantisti iz vsega sveta.

Prireditev bo potekala od 28. do 30. oktobra na Izutsu Yashiki (769-2901 Higashikagawa, Hiketa 2163, Japonska,. Tel +81 879-238557).

Letošnji svetovni lutkovni festival je posvečen Nemčiji. Prikazane bodo ročno narejene lesene lutke, hrestači, božične piramide, hiše za lutke itd. Veleposlaništvo Nemčije, Nemška hiša v mestu Naruto in Japonsko-nemško združenje iz Kagawe so sponzorji dogodka.

Kulturni program bo dopolnila izvedba 9. simfonije Ludwiga van Beethovna. Lokalne restavracije bodo nudile širok izbor mednarodnih jedi.

Dodatne informacije so na voljo na http://world-doll-festival.org/ ■

*Etsuo Miyoshi*
*Predsednik Odbora svetovnega lutkovnega festivala*



*Etsuo Miyoshi inter germanaj nukskrakantoj | Etsuo Miyoshi med nemškimi hrestači*

# Esperanta junulara movado en Nederlando
# Mladinsko esperantsko gibanje na Nizozemskem



Nederlanda Esperanto-Junularo (NEJ) vigle kontribuas al esperanta movado. La organizon formas kvin estraranoj - kvar nederlandanoj kaj unu slovenino. La nederland-slovena kombino evidentiĝas esti sukcesa. Ni ĉiumonate organizas ludotagon, kie ni strebas kombini amuziĝon kun praktikado de la lingvo. Ni faras diversajn lingvajn kaj nelingvajn ludojn, ekscias pri diversaj Esperanto-okazaĵoj kaj ĉefe ĝuas la etoson.

La dua ĉefa aranĝo, pri kiu NEJ respondecas, estas aŭtuna semajnfina esperanta renkontiĝo - KKPS, KlaĉKunveno PostSomera. La unua KKPS okazis en 2012 (kekajn jarojn pli frue ekzistis la aranĝo PSKK, PostSomera KlaĉKunveno, en Flandrio, la nederlandlingva parto de Belgio). Ekde tiam ĝi iĝis bone konata kaj ŝatata inter junaj Esperantistoj de la tuta Eŭropo.

La ĉi-jara KKPS okazos en Delft, bela universitata urbo, kiun indas viziti. Se vi emas esplori Nederlandon kaj dume ĝui esperantajn prelegojn, ludojn, muzikon kaj klaĉojn, aliĝu ĉe http://kkps.esperanto-jongeren.nl/.

*Nika Siebenreich*

Nizozemska esperantska mladina (NEJ – Nederlanda Esperanto-Junularo) močno prispeva k esperantskemu gibanju. Organizacija je sestavljena iz petih članov sveta – štirje so Nizozemci ena članica pa je Slovenka. Kakor je videti, je nizozemsko-slovenska kombinacija uspešna. Vsak mesec organiziramo dneve iger, kjer si prizadevamo združiti zabavo z uporabo esperantskega jezika. Igramo se različnih jezikovnih in drugih iger, se seznanjamo z različnimi esperantskimi dogodki in predvsem uživamo v prijetnem ozračju.

Drug pomemben dogodek, ki ga organizira NEJ, je jesensko srečanje – Klaĉ Kunveno Post Somera (KKPS) . Prvi KKPS je potekal leta 2012 (nekaj let prej je obstajal PSKK, PostSomera KlaĉKunveno, v Flandriji, nizozemsko govorečem delu Belgije). Od takrat je srečanje postalo znano in priljubljeno med mladimi esperantisti iz vse Evrope.

Letošnji KKPS bo potekal v Delftu, lepem univerzitetnem mestu, ki ga je vredno obiskati. Če želite raziskati Nizozemsko in v tem času uživati v predavanjih v esperantu, igrah, glasbi in klepetu, se prijavite na http://kkps.esperanto-jongeren.nl/

*Nika Siebenreich*



*Delft*



*Delft*



*Loko de la kunveno:*
*Scoutcentrum Delft – Het Kruithuis.*

## Nika Siebenreich



*Naskiĝis 26an de novembro 1987 en Ptuj, kie ŝi vizitis baz- kaj mezlernejon. Ŝi studis en Ljubljana Filozofa fakultato ĉe Departmento por kompara kaj ĝenerala lingvistiko, kie ŝi doktoriĝis 10-an de junio 2016.*

*Kun esperanto ŝi renkontiĝis en la unua studjaro, kie ŝi lernis ĝin ĉe dr. Simona Klemenčič kaj poste ĉe mag. Janez Jug. Al pli aktiva esperanta mondo enkondukis ŝin ŝia koramiko, kiun ŝi renkontis en iu esperanta renkontiĝo en Hungario. Momente ili loĝas en Utrechto. Esperanto iĝis ilia komunika lingvo. En esperanto ĝoje babilas ankaŭ ilia papago.*

*Rojena 26. 11. 1987 na Ptuju, kjer je obiskovala osnovno šolo ter gimnazijo. Študirala je na ljubljanski Filozofski fakulteti na Oddelku za primerjalno in splošno jezikoslovje, kjer je doktorirala 10. junija 2016.*

*Z esperantom se je srečala v prvem letniku študija, kjer se ga je učila pri dr. Simoni Klemenčič in kasneje pri mag. Janezu Jugu. V aktivnejši svet esperanta jo je kasneje vpeljal njen fant, ki ga je spoznala na esperantskem srečanju na Madžarskem. Trenutno živita v Utrechtu, esperanto pa je njun sporazumevalni jezik. V esperantu pa z veseljem poklepeta tudi njun papagaj.*

Julio Baghy

# La ŝuflikisto

Tia granda domo, en kia ankaŭ mi loĝas, respegulas la bildon de la metropolo. Ĝi tenas en si ĉiuspecajn kaj ĉiurangajn homojn. La loĝantoj retiras sin al siaj skatolkavernoj kaj ne interesas ilin la zorgoj, ĉagrenoj de la najbaroj. Estas ĉi tie generalo kaj invalida soldatalmozulo; estas pozanta ventkapa profesoro kaj por pano luktanta studento; riĉa posedanto de ĉapelmagazeno kaj pala modistino, laboranta ĝis blindiĝo ĉe petrollampo; korpulenta bankiero kaj bankservisto kun sep malsataj gefiloj; per aŭto paradanta teatrodirektoro kaj sengroŝa aktoro. Ĉiu estas tiaspeca homo, kiu ne povas interesiĝi pri la alia, ĉar tiam -- ho kiom da superfluaj penoj! -- eble li povus eĉ helpi sian homfraton.

Sed ne temas pri tio. Mi volas rememori pri mizera ŝuflikisto, kiu loĝis ĝuste, en kela ĉambro, sub mia loĝejo. Jes, li loĝis, ĉar antaŭ semajno li transloĝiĝis tien, kie la zorgoj pri luprezo jam ne torturas plu. Li mortis, kaj malproksime, tre malproksime de tie ĉi, lasis enterigi lin -- la urba magistrato. Kvar nerabotitaj tabuloj, kelkaj najloj sufiĉas por tia modesta vireto, kiu flikadis nur malbonajn ŝuojn dum sia tuta ekzistado. Cetere li ricevis senpagan ripozejon kiel la eminentuloj de la nacio. Ĉu tiom ne sufiĉas por honorigo?

Ne! Guste pro tio mi skribas pri li. Restu surpaperigita memoraĵo pri la maljuna ŝuflikisto. Li meritas tion, ĉar li estis - homo.Stranga hometo li estis. Oni priridis lian manion. Mi prilarmis ĝin. Oni trouzis lian sentimentecon. Mi estus preferinta kisi liajn grandajn manojn, deformitajn de laboro. Eĉ nun mi vidas lin antaŭ mi tiel, kiel dum tiuj posttagmezaj horoj, kiam apogante sin al la pordego li fumis cigaredon, fiksitan inter du dentoj por ne malhelpi lin en la parolado. Verŝajne nur tiuj du dentoj restis nedifektitaj ĉe li. Konservis ilin por ĉiam la - fumo. Ĝiba dorso, plata brusto, C-formaj kruroj kaj proporcie multe pli granda dekstra mano estis lia metia ŝildo: "mi estas je via humila servo, sinjoraj moŝtoj, la tre malmultekosta ŝuflikisto."

Jarojn mi vidis lin, jarojn li incitadis mian interesiĝon, kaj jarojn mi ne alparolis lin. Kial? Mi mem ne scias.

Foje vespere li haltigis min ĉe la pordego.

"Mi vidis, sinjora moŝto, ke via filino havas flikendajn ŝuojn. Bonvolu sendi ilin al mi."

Tiel simple li parolis, kiel laborpetanto.

"Nu bone, avĉjo; mi sendos ilin."

Havu laboron la maljunulo, mi pensis, kaj por ne forgesi la aferon tuj mi aranĝis ĝin post mia hejmenveno.

Vespere ĉio estis en ordo aŭ pli ĝuste tute kontraŭe. La flikitaj ŝuetoj de mia filino paradis sur la tableto. Bela zorga laboraĵo, tia bela kaj zorga, kia povas aspekti la flikista majstraĵo, sed ... mia edzino rakontis, ke la maljunulo ne volas akcepti monon por ĝi. Tio ĉi surprizis, konsternis min, kaj sincere konfesante mi iom ekkoleris. Tuj mi rapidis al li por aranĝi la ĝenan aferon.

Li sidis ĉe sia labortableto kaj vespermanĝis. Inter la diversaj iloj antaŭ li staris botelo da lakto kaj tranĉaĵo da pano. Ĉirkaŭ li sur la planko kuŝis amaso da infanŝuoj, botetoj, sandaloj. La peza sufoka atmosfero kvazaŭ kunpremis mian gorĝon kaj tordis la nazon. Petrollampo kun rompita cilindro flave lumis kiel forgesita kandelo ĉe katafalko. Fumteksita vualo kovris ĝian cilindron.

Mi ekhaltis antaŭ li. Li alrigardis min. La melankolia rigardo de liaj grizaj okuloj senarmigis mian koleron. Ŝerctona riproĉo maskis mian subitan emocion.

"Nu, avĉjo, jen kia sensencaĵo! Ĉu oni vidis similan? Mi riparigas ĉe vi la ŝuetojn de mia filineto kaj vi ne volas akcepti la prezon por via laboro."

"Ĉu tio afliktas vin?" demandis li post ioma silento.

"Jes, eĉ ofendas min."

"Tiam pagu por ĝi," diris li kun mallaŭta voĉo.

"Kiom mi ŝuldas?"

"La ĝojon de du infanoj."

La respondo surprizis min. Nekomprenante ĝian sencon mi embarasite kalkulis la monbiletojn. Fine estis necese ripeti la demandon.

"Kiom mi pagas?"

"La ĝojon de du infanoj."

Maniema maljunulo, mi pensis kaj preninte la sumon kutiman por ŝuplandado de paro da ŝuetoj mi metis ĝin sur la tablon.

"Jen prenu, avĉjo!"

Li karese palpis la monbiletojn, poste zorge gladis ilin per siaj larĝaj manplatoj sur la genuo kaj milde ridetis al mi.

"Humile mi dankas, sinjora moŝto, eĉ en la nomo de la tria infano."

La monon li lokigis en la fundon de la tirkesto kaj poste, kvazaŭ forgesante pri mia ĉeesto, li daŭrigis la manĝadon. Mi ne povis tuj foriri. La interesiĝo, dum jaroj retenita en mi, nun volis profiti la okazon, sed mi ne sciis kiel komenci ... Atendo ... La maljunulo turnis sian rigardon al mi, sed nun demando sidis en la okulparo. Ankoraŭ gluteto da lakto, ankoraŭ porbuŝa peceto da pano kaj li donis vortojn al la muta demando:

"Ĉu mi redonu la trian infanon?"

"Ne, ne!" mi protestis energie kontraŭ la miskompreno. "Kiel vi povas eĉ pensi tion? Ne pro tio mi atendas, sed mi deziras aŭskulti vian parolon pri vi, pri via vivo, pri ..."

"Por kio? Vi vidas, sinjora moŝto, mi estas simpla ŝuflikisto. Kion paroli pri tio?" kaj li indiferente suĉis longan gluton el la botelo.

"Jes ... vere ... kion paroli pri tio? ... Sed klarigu al mi, ĉar mi ne komprenas, kial vi volis senpage ripari la ŝuetojn de mia filineto?"

"Ĉar ili estis truetaj, kaj ... kaj ... tiuj de la sinjora moŝto simile estas tiaj."

Mi sentis hontruĝon sur miaj vangoj. Jen, por ĉio oni devas pagi la prezon. Eĉ por la plej bonvola interesiĝo.

"Tiu ĉi paro servas por la ĉiutago," mi provis senkulpigi min. La sinjoraj moŝtoj ofte defendas la prestiĝon per mensogetoj. "Sed ne pri tio temas. Diru, avĉjo, kial vi flikadas senpage? Ĉar por multaj vi laboras senpage. Nun mi komprenas, kion signifas via kurioza tarifo ... "

Longe li ne respondis, sed vidante mian obstinan atendon fine li ekparolis.

"Nu, bone, mi rakontos tion, por ke oni eksciu, kia hipokrita mi estas. Pro egoismo mi flikadas senpage. Mi akiras por mi ĝajon per infanĝojo ... Jam pli ol dudek jarojn mi vivas en tia ĝojo. Tre malmultaj povas aserti, ke ili havis tiome daŭran ĝojon. Nun mi jam staras proksime al mia tombo, kaj tamen la ĝojo gastadas konstante ĉe mi. Ĝi rekompencas min por la malplena juneco."

"Ĉu via edzino mortis tro frue?"

"Neniam mi havis tian."

"Ĉu trompiĝo?"

"Neniam mi povis trompiĝi, ĉar neniu amis min. Mi estis tre malbela knabo, kurbkrura, pigmea kun plata brusto, senforma nazo kaj flamruĝaj haroj. Oni trovis min ie sur strato. Neniu amis min, escepte mian mastron. Pro amo li karesis ĝibon sur mian dorson, por ke mi havu rememoraĵon pri li, sed tamen li donis manĝaĵon al mi kaj zorgis pri miaj ĉifonoj. Li estis ja tia. Estas homoj, kiuj pro amo oferas sin, kaj estas tiaj, kiuj pro amo oferas aliajn. Mi ne volas kalumnii lin. Post lia morto eĉ mi heredis ion. Lia vidvino, forpelanta min el la domo, ĵetis post mi liajn alenojn, martelojn, ŝulignojn ... Mi devis ekmigri, sed la homoj evitis min ĉie kaj ankaŭ mi evitis ilin. Foje, post longa de vilaĝ-al-vilaĝo vagado, mi venis en la ĉefurbon. Ĉi tie ĉio pliboniĝis. Oni ne evitis min plu, ĉar oni tute ne rimarkis min. Kelkajn jarojn mi flikadis, laboradis en la periferioj. La malriĉuloj alportis riparigi siajn botojn, ŝuojn, pantoflojn, kaj el ili kelkaj volonte paroladis kun mi pro la -- kredito. Mi vivis, ĉar ne venis al mi la penso "ne vivi." Foje iu foirartisto vokis min al si. Li serĉis kuriozaĵon por sia budo kaj mi tre taŭgis esti "hundkapa tataro" en lia budo. Tiam mi ekploris la unuan fojon. Mi ne iris kun li, eĉ de tiu tempo pli zorge mi kaŝis min en mia kelo ... Foje mi havis najbaron, tre, treege malriĉan viron. Li similis al mi kaj nia abomena aspekto fariĝis la bazo de amikeco. Sincere mi ekamis lin, ĉar ankaŭ li ridetis neniam. Mizera homo li estis. Ne havante metion li vivis per tio, kion la okazo donacis al li ... Iun tagon, mi rememoras, ke estis kruela vintra frosto, kiam li vizitis min en la kelo. Li sidis ... sidis kaj ridetis. Li kondutis strange, tre strange. Li sidis kaj ridetis: 'Kio estas al vi?' mi demandis. Li komencis krii, kriadi, ke li sentas sin feliĉa kaj ke li havas tian ĝojon, kian li esperis neniam. 'Ĉu vi ĝojas? Kial?' mi demandis. Li respondis, ke pro tio, ĉar li donacis sian peltan subjakon al infano, duonnude tremanta sur la strato. Poste li ekploris, ridetis, ridegis kiel frenezulo, kaj liaj larmoj abunde fluis, fluis ... Strange, mi pensis, ĉu tia estas la feliĉa ĝojo? Kaj mi demandis: 'Kio estas la feliĉo en tio?' Li respondis: 'Provu kaj vi ekscios!' 'Mi ne havas subjakon por donaci,' mi respondis. 'Ne gravas la subjako, sed vi povas fari botetojn, vi scias flikadi truajn ŝuetojn. Provu tion!' ... Nu kaj foje mi provis kaj poste ankaŭ mi ekploris, ridetis, ridegis kiel frenezulo, ĉar -- Dio mia! -- la ĝojo de la malriĉaj infanoj estas ĉiela donaco. Ĝi ŝtelas sin en la koron de la orfa maljunulo kaj ĝi fabelas tiajn rakontojn, kiajn neniam povis fabeli al mi -- patrina buŝo. ... Rigardu, sinjora moŝto, ĉi tiun pugnograndan ŝueton! Al la eta Magdalenjo de la korto-balaisto ĝi apartenas kaj morgaŭ Dio repagos la plandumon, kiam ridetantaj infanlipoj ekkrios: 'Bela ŝueto! ... mia ŝueto!' ... Jen pro kio mi petis por la plandado la ĝojon de du infanoj ..."

Dolora ĝojo karesis mian koron. Mi ne rememoras, kiel mi forlasis la mizeran ŝuflikiston, sed tion mi scias, ke multajn semajnojn mi serĉis truojn sur infanŝuoj kaj sincere bedaŭris, ke mi ne scipovas flikadi, plandadi. ...

Ĉio pasis. La senpaga ŝuflikisto de cent kaj cent paroj da infanŝuetoj jam transloĝiĝis por ĉiam al la nekonata mondo kaj lasis siajn ilojn orfaj. Ho kiel mi deziris, ke lian ĉerkon akompanu tuta armeo da dankemaj infanaj koroj, sed ĝin sekvis nur lignomiena pastro, alkomandita policano kaj mi. ■

***Julio BAGHY*** *(originale BAGHY Gyula, pseŭdonome Jobo kaj Paĉjo), (naskiĝis la 13-an de januaro 1891 en Szeged, mortis la 18-an de marto 1967 en Budapeŝto) estis verkisto kaj aktoro. Naskita en Hungario, li lernis Esperanton en 1911 kaj komencis sian laboron por la Esperanto-movado dum sesjara milita kaptiteco en Siberio. Elstara movadano kaj Esperanto-instruisto. Iama vicprezidanto de la Akademio de Esperanto.*

*Lia patro estis drama aktoro kaj lia patrino estis teatra sufloro. Post siaj lernejaj studoj ankaŭ li fariĝis aktoro kaj reĝisoro de diversaj teatraĵoj. La milito rompis lian karieron kaj ses jarojn li devis pasigi for de sia patrujo en rusa militkaptiteco. Ankoraŭ dum lia junaĝo multaj liaj poemoj kaj noveloj hungarlingvaj aperis en hungaraj gazetoj. En 1911 li ekkonis Esperanton kaj ĝia "interna ideo" tuj forlogis lin. Lia ampleksa Esperanto-agado komenciĝis jam en la Siberia militkaptitejo, kie li gvidis multajn kursojn por diversnacianoj. Reveninte al Hungarujo post la milito, li fariĝis unu el la ĉefaj gvidantoj de la Esperanto-movado: multaj diversgradaj kursoj, gvidado de E-Rondo Amika, aranĝo de literaturaj vesperoj, ktp.*

*https://eo.wikipedia.org/wiki/Julio_Baghy*



*Julio Baghy (www.delcampe.net)*

Espero izdaja | Eldonas Esperantsko društvo Maribor | Esperanto-societo Maribor, Pod vinogradi 4, 2351 Kamnica
Uredil | Redaktis: Mario Vetrih, lektoriral | kontrollegis: Vinko Ošlak.
Izhaja dva krat letno. | Aperas du foje pro jaro. Izvod je brezplačen | La bulteno estas senpaga - ISSN 2463-8323
**G:** 041 27 57 31, **E:** info@esperanto-maribor.si, **W:** http://esperanto-maribor.si
**Matična številka:** 5007992000, **TRR:** IBAN SI56 0451 5000 0790 670 (Nova KBM d.d.), **Davčna številka:** 35897163